[noto] fonto: kopio de la originala libro konservata en Otani Universitato
Verda Ermitejo, Kolattena, Bandarawela , Cejlono, 1956
fonto: "budhana kuriero", n-ro 2518-2, 1975 (B.E. 2518)
reapero: "La Esperanta Budhano", n-ro 17, 2018 (B.E. 2561)
originale skribita en la angla lingvo

# *La Koro de Budhismo*
# *(Sistema Kurso en Budhismo)*

**Cejlona Sanghano**
**Njanasatta Thero**, Cejlono[1]

Budhismo povas esti studata kiel filozofio aŭ kiel unu el la mensaj sciencoj, sed ofte ĝi estas traktata kiel unu el la grandaj mondreligioj, kies adeptoj nombras 550 milionojn da aŭ puraj budhanoj aŭ duone hinduoj, duone teozofoj, aŭ parte konfuceanoj kaj laocianoj. Antaŭ ol decidi por si mem, ĉu budhismo estas filozofio, scienco aŭ religio, estos utile konsideri la ĝeneralajn konceptojn pri religio.

## Kio Estas Religio?

Vortaroj difinas la signifon de la vorto *religio* tiel: Sistemo de kredo aŭ fido kaj adorado; homa allaso aŭ percepto de superhomaj regnantaj potencoj aŭ fortoj, speciale de persona Dio, kiu rajtas postuli obeon kaj adoron al si, kaj la efiko de tia kredo kaj adorado je homa sinteno kaj konduto. *Religia*, konforme al tiu difino, signifas: plena de religia sento, diontima, pia, kaj ankaŭ *skrupula kaj konscienca*. Tial, se oni deklaras, ke iu estas senreligiulo aŭ ateisto, oni ofte tute erare kaj malprave sugestas, ke tia homo estas senskrupula kaj senkonscienca. Budhanoj ofte estas kondamnataj tiel, kaj tial multaj impreseblaj budhanoj sentas sin devigataj, eviti tian embarason pro manko de religio per deklaro, ke budhismo estas ilia religio.

En tre liberala senco, oni povas difini praktikan religion jene: Sistemo de filozofiaj kaj etikaj instruoj, la akcepto kun fido de tiuj instruoj, kaj ankaŭ la sekvado de la akceptitaj doktrinoj. En tiu ĉi senco budhismo estas eminenta religio meritanta sekvadon kaj praktikadon.

Se ni povus demandi la homojn, pri kiuj ni posedas la unuan historian scion: "*Kio estas religio?*", ili eble respondus konforme al la vortara difino, dirante, ke *religio estas la*

---

[1] pri la aŭtoro bv. legi la retpaĝon: https://eo.wikipedia.org/wiki/Martin_Novosad

*maniero de adorado de la dioj*. La vorto *dioj* signifus por ili: La potencoj direktantaj la mondon aŭ almenaŭ influantaj la agadon de homoj kaj la okazaĵojn en la mondo. *Religio* do signifus por ili la tutan sintenon koncerne tiujn potencojn. Inter homoj, kiuj akceptas budhismon kiel religion, oni distingas du aspektojn, nome la religion personan, kaj la institucian aŭ organizan religion.

**PERSONA RELIGIO** estas la interna aŭ intime personeca riverenco por la fondinto de la religio kaj la instruistoj de tiu sistemo, kaj la aplikado en sia ĉiutaga vivo de la filozofiaj kaj etikaj principoj de tiuj instruoj, sen partoprenado en la pure eksteraj mamifestoj aŭ almontroj de la religio organizita kaj institucia. Multaj kleruloj nun nomantaj sin *senreligiuloj* aŭ eĉ *ateistoj*, apartenas al tiu ĉi kategorio de persona religio.

**ORGANIZITA AŬ INSTITUCIA RELIGIO** estas la religio de la popolo, kiel oni komprenas ĝin en nia epoko: religio kun multa pompo, ceremonioj, precesioj kaj publika adorado en preĝejoj kaj temploj. Ankaŭ en Sri Lanka (Cejlono) budhismo fariĝas institucia organizita religio, kiel oni povas tion vidi dum la famaj paradaj procesioj kaj pilgrimoj en Kandy, Kataragama, en multaj temploj kaj dum publikaj festoj kaj predikoj. Intelektuloj evitas tian emocian religion, sed la popolaj klasoj komprenas nur tian religion kaj ŝatas nur tian eksteran manifeston de sia fido. Estas interese konstati, ke ekde la unua tempo budhismo kontentigis ĉiujn temperamentojn: Al la intelektulaj klasoj ĝi prezentas subtilan kaj altegan filozofion kaj etikan sistemon, kiuj kondukas al iluminiĝo kaj liberiĝo de ĉia sufero. La ordinara homo trovas en budhismo objekton de la plej sublima kaj altega admiro, amo kaj respektego, ja eĉ adorado, nome la Iluminulon, kiu ja estas nomata *La Instruanto de Dioj kaj Homoj* (en palia lingvo: satthā devamanussānam). Plue li trovas en budhismo grandiozan adoradon publikan kaj la esperon atingi vivon en la ĉielo per sia sindono al bonfaro kaj sekvado de la budhanaj virtoj kaj farado de agoj meritaj.

Religio povas esti ankoraŭ subdividata en du ĉefajn kategoriojn: *Religio Revelacia*, kaj *Religio Natura*.

**REVELACIA RELIGIO**, oni supozas, malkaŝiĝis aŭ manifestiĝis al la homaro kiel la leĝo kaj volo de Dio, kaj estis instuata de profetoj, specialaj senditoj aŭ eĉ *Filoj de Dio*. La hebrea, kristana kaj islama religioj estas konsiderataj la principaj kaj tipaj revelaciaj religioj, kaj laŭ la grado de ilumino de iliaj adeptoj, nur unu el ili, nome *la sia* estas la sola vera religio.

**NATURA RELIGIO**, aŭ pli konkrete, religioj laŭ la kristanaj aŭtoroj, estas ĉiuj ceteraj manifestiĝoj de religio aŭ pseŭdoreligio. Natura religio estas klasifikita en tri kategoriojn:

**FIZIKA RELIGIO**, la adorado de la naturaj fenomenoj kaj fortoj, estis supoze inspirita en la primitiva homo per la aspekto de la Naturo. Oni diras, ke la unuaj formoj de fizika religio inspiriĝis en la homo pro teruro kaj respekta timemo, kiujn li spertis

vidante la fortegajn fenomenojn naturajn: la montegojn, riveregojn, la maron, tertremon, tempeston, fulmotondron, kaj ĉiajn fortegajn ŝanĝojn en sia timiga ĉirkaŭaĵo. Timo kaj avido, kaj la deziro gajni la favoron de la potencoj regantaj la naturon kaj la naturajn fenomenojn - ankaŭ la vivon de homoj - estis la kondiĉoj por la estiĝo de la kredo pri dioj, animoj, spiritoj kaj potencaj supernaturaj estaĵoj, kaj de la kredo pri la ebleco kaŭzi ilian malplaĉon aŭ gajni ilian favoron.

**ANTROPOLOGIA RELIGIO** bazas sin je la naturo de homo kaj kondukas al la adorado de prapatroj, aŭ de la unua homo, aŭ Dio, kiu estas konsiderata kiel praulo de la reĝa familio kaj de ĉiuj homoj. La japanoj kaj ĉinoj estas ofte klasifikataj kiel sekvantoj de antropologia religio, krom se ili jam apartenas al budhismo aŭ al alia formo de religio natura aŭ revelacia.

**PSIKOLOGIA RELIGIO** okupiĝas pri la studo de la homa animo kaj ĝia rilato al Dio. Hinduoj, kvankam ili deklaras, ke ilia religio estas revelacia, kaj sekve malkaŝita al la homaro hinda de Dio aŭ de sinsekvaj enkarniĝoj de Dio, estas rigardata kiel religio psikologia, kun aldono de aliaj formoj de naturaj religioj.

**BUDHISMO** estas la plej granda obstaklo por kleruloj de kompara scienco de religioj, ĉar iliaj klasifikoj ne estas aplikeblaj tie ĉi. Budhismo apartenas al neniu el la supraj kategorioj de religio, kvankam ĝi enhavas elementojn de religio revelacia kaj religio natura. Budhimo estis malkaŝita al homaro de la Budho, kiu ja nomas sin *La Instruanto de Dioj kaj Homoj*. Dum ĝia longa ekzisto, budhismo asimilis elementojn de natura religio. Ni povas provizore difini budhismon jene: *La vero, kaj la ilumino atingita, malkaŝita al la homaro de la Iluminulo, realigota de ĉiu el ni individue*.

Kvankam liberpensuloj, ateistoj kaj eĉ materialistoj ofte aklamas la Budhon kiel unu el la siaj, tamen budhismo ne estas ateisma instruo, se oni konsideras la vorton ateismo kiel esprimon de riproĉo kaj kondamno. Budhismo ne malŝparas tempon kaj monon en batalo kontraŭ la kredo pri Dio aŭ dioj, kvankam ĝi anstataŭis ĉiujn teismajn konceptojn kaj kredojn. Oni povas nomi budhismon *Superteismo*, ĉar kiel jam dirite, la Budho estas ofte nomata *La Instruanto de Dio kaj Homoj* (palie: satthā devamanussānam). Fondintoj de aliaj religioj deklaris, ke ili ricevis sian mesaĝon aŭ instruon de Dio, sed la Budho en la paliaj kanonaj tekstoj estas prezentata, ke li instruis en la diversaj ĉieloj; kaj kun subtila humoro oni prezentas lin konvinkanta eĉ la plej altan Maha Brahma pri lia iluzio, se li konsideras sin eterna kaj la Patro de ĉiuj kaj kreinto de ĉio.

Kvankam la ordinaraj sekvantoj de la Iluminulo kelkfoje ja atendas helpon kaj protekton de la dioj; kaj por la plej multaj el ili iu ajn el la dioj estas Dio por ili, tamen tiuj ĉi ĉielaj estuloj estas en la Frua Budhismo traktataj kiel bonaj piaj laikaj budhanoj, disĉiploj de la Budho, kaj tial ĉiam deziremaj kaj pretaj protekti la verajn sekvantojn de la Iluminulo, se ili bezonas la helpon kaj protekton de la dioj.

Budhismo estas inspirita de la ekzisto de sufero, kaj ĝi estas la vojo al la liberiĝo de ĉia sufero. La serĉado de iluminiĝo de la Budho ja estis motivita nek per timo, nek per deziremo kaj sopiro pri gloro, sed per la firma decido solvi la problemon de sufero kaj konduki ĉiujn inteligentajn vivantojn al liberiĝo kaj iluminiĝo. Se timo gravas en Budhismo, ĝi estas ja transformita al la abomenado de ĉia sufero; kaj se deziremo motivas religion, en Budhismo deziro estas sublimita al la penado pri liberiĝo kaj iluminiĝo por si kaj por ĉiuj, kaj tiuj ĉi du virtoj impulsas la budhanojn aŭ estas motivoj al la aplikado de la Instruo en ilia ĉiutaga vivo. Se ni ekkonas, kion aliaj komprenas per la vorto religio, por la budhanoj ja ne gravas, ĉu oni nomas Budhismon religio aŭ alie, kaj tial ili preferas la originan vorton sanskritan **Dharmo** (palie **Dhamma**).

## La Vivo de la Budho

La tradicia historio de la vivo de la Budho kiel historia persono povas esti mallonge dirita jene: Li naskiĝis antaŭ 2,580 jaroj — tio estas en 624 antaŭ risto — ĉe **Lumbini** en suda Nepalujo, proksime al la Himalaja montegaro. Lia patro estis reĝo Sudhodana — laŭvorte: *La posedanto de blanka aŭ pura rizo* — kaj lia patrino estis reĝino Maha Maja. La patrino naskis sian unuan filon dumvoje de **Kapilavastu**, la reĝa urbo, al sia naska urbo **Devadaha**, la urbo de ŝiaj parencoj. Ŝia filo estis omita Sidharto Gotamo, kaj pasigis la unuajn dudeknaŭ jarojn de sia vivo en la palacoj de sia patro, kiu ja estis la ĉefa princo aŭ reĝo — hinde: *raĝa* — en tiu subhimalaja lando, kiu en nia tempo estas nomata la *Terraj de Nepalo* [tiel!], situanta ĉe la landlimo de moderna Respubliko de Hindujo. *La Sakjoj* de la regiono de la reĝo Sudhodana estis gento aŭ klano de *militistoj* el la supera klaso de la enloĝantoj de Hindujo en tiu tempo; la plej proksima klaso estis nomata *bramanoj*, kaj multaj el ili, ne ĉiuj, estis pastroj profesiaj kaj heredaj. La naskiĝloko de la Budho estis vizitita de budhana reĝo Asoka, kiu regis 273-232 antaŭ Kristo, do proksimume ducent jarojn post la forpaso de la Budho. Reĝo Asoka ordois, ke ŝtona kolono estu starigita por daŭrigi la memoron kaj proklami al la mondo la viziton de la reĝo al la naskiĝloko de la Budho. La kolono estis retrovita en 1896, kaj la skeptikulo povas legi la enskribon en la asoka skribsistemo, en la magadha lingvo, nome: *Tie ĉi naskiĝis la Budho*, la saĝulo el la gento Sakja.

Kiam la filo de reĝo Sudhodana estis dudek-naŭ-jara, li abdikis sian heredan rajton, kaj fariĝinte senhejma religia studento, pilgrimanto kaj ermito, li praktikis ĉian metodon de mistika kontemplado medita kaj ĉian imageblan sintorturon asketan, kiujn tiam instruis la plej famaj filozofoj de mistiko. Post ses jaroj de studo kaj praktikado de la tiamaj sistemoj, li elkomprenis la vanecon de la sistemoj kaj de tia ekstrema sintorturo asketa, forlasis ilin, kaj tiam li eltrovis, aŭ pli korekte: *malkaŝis*, la mezvojon inter la du ekstremoj de troa ĝuado de sensplezuroj kaj praktiko de sintorturaj asketaj. Li fine, en sia sesa jaro de la religie-mistika-kaj-filozofia vivo senhejma, atingis iluminiĝon budhan ĉe **Budha-Gaja**, en moderna **Bihar**. Post sia budhiĝo li iris al **Benares**, por ke li instruu

sian novan metodon, la Vojon al Iliminiĝo. Li instruis kaj gvidis milojn da disĉiploj, laikaj kaj monaĥaj, dum 45 jaroj, ĝis li forpasis kiel okdekjarulo meze de siaj disĉiploj ĉe **Kusinara**, moderne **Kassia** en **Gorakpura** distrikto de **Norda Hindujo**, proksime al Nepalujo. Multaj okazaĵoj el la vivo de la Budho estas konformitaj per la ŝtonaj kolonoj de reĝo Asoa. Sur tiuj kolonoj ja troviĝas engravuritaj eskriboj indikantaj, kie la Budho naskiĝis; alia kolono indikas la lokon ĉe Benares, kie li predikis sian unuan parolon pri la Mezvojo. Tiaj kolonoj aktive indikis la lokon, kie la Budho atingis sian Iluminiĝon, kie li restadis kaj fine, kie li forpasis e finan Nirvanon kiel okdekjara saĝulo kaj adorata sanktulo.

La informoj pri la vivo kaj instruo de la Budho laŭ la aŭtentikaj literaturaj dokumentoj de la palia kanono estas konfirmitaj per multaj arkeologiaj malkovraĵoj de britaj kaj aliaj eŭropanaj instruituloj esploraj, kiuj ne nur remalkovris la sanskritajn kaj paliajn tekstojn de la aŭtentikaj paroloj de la Budho, sed ankaŭ la asokajn ediktojn kaj kolonojn kun enskriboj, kaj fine elfosis la monumentojn budhanajn, kiuj tiam enhavis relikvojn de la Budho kaj de liaj emientaj disĉiploj kaj unuaj apostoloj. Tiuj elfosaĵoj, precipe la urnoj kun enskriboj kaj aliaj gravuraĵoj aŭ skulptaĵoj el la kvara kaj tria jarcentoj antaŭ la Kristo kofirmas la informojn de la aŭtentikaj paliaj dokumentoj de la Paroloj de la Budho, kiuj nun estas studataj en la origina palia lingvo kaj en anglaj kaj aliaj tradukoj troveblaj en ĉiu budhana monaĥejo kaj biblioteko en grandurboj kaj en la universitatoj ne nur en la oriento budhana, sed ankaŭ en la studejoj de specialaj kleruloj kaj en la bibliotekoj kaj universitatoj de ĉiu granda urbo de la okcidenta mondo nebudhana.

La kleruloj esploraj en budhologio malkonsentas inter si pri la ekzakta dato de la naskiĝo aj morto de la Budho. La paliaj kronikoj cejlonaj el la kvina jarcento de nia epoko, sed bazita sur komentarioj el la tria jarcento antaŭ Kristo kaj tradicioj oraj [tiel! eble "buŝaj"?] kaj skribaj el tempo plej proksima al la aktuala vivo de la Budho, indikas, ke la forpado de la Budho okazis ĝuste antaŭ 2,500 jaroj, do en 544 antaŭ la Kristana epoko. Sed komparaj studoj de la historioj de la reĝoj en Hindujo kaj iliaj rilatoj al la greka Aleksandro la Granda kaj liaj posteuloj, la reĝoj *Seleŭcidaj* de la tuta Azio okcidente de Hindujo, inkikas, ke eble estas eraro en la kronikoj kaj ĝiaj datoj kalkulataj laŭ la jaroj de la regado de individuaj reĝoj, kaj ne laŭ fiksa dato en la historio, kaj ke tial la Budho naskiĝis kaj ankaŭ forpasis 60 jarojn post la datoj indikitaj aŭ fikseblaj laŭ la *Mahavamso*, la kroniko palia de Cejlono kaj ankaŭ de budhismo ne nur e Cejlono sed ankaŭ en Hindujo, de kie ĝi venis Cejlonon en la tria jarcento antaŭ la Kristo, dum la tempo de la reĝo Asoka en Hindujo, kiu ja sendis la unuajn misiojn ne nur la Cejlonlo, sed ankaŭ al aliaj landoj najbaraj, ja eĉ al la grekaj regnoj de siaj *Seleŭcidaj* aliancanoj en Sirio, Egiptujo, kaj ankaŭ al Grekujo.

Budhanaj legendoj estiĝintaj kalkajn jarcentojn post la forpaso de la Budho rakontas, ke la patro de la Budho estis tre potenca reĝo de tuta Hindujo: tio estas nur legendo; la

historiaj faktoj indikas, ke Sudhodana eble tute ne estis reĝo en nia senco, sed nur ĉefa reganta princo de sia klano *sakja*, kiu estis parto de la regno *Kosala*, kaj tiu poste unuiĝis kun la *Magadha* regno, la centro de la granda regno de Asoka. La fakto, ke Sudhodana ne estis grada reĝo, nur faras al ni la patron de la Budho des pli kara, ĉar li tiel pli akordiĝas al la idealo de modernaj demokrataj tempoj, kaj mem ĉeestis aŭ eĉ partoprenis la kultradon de siaj rizkampoj, dum lia filo, princo Sidharto Gotamo, laŭlegende meditis en la ombro de rozpomarbo. Kio ja gravas, estas la historiaj faktoj kaj lokoj, kiuj pruvas, ke la Budho vere estis historia persono kaj tial liaj instruoj estas historiaj kaj aŭtentikaj paroloj de la Budho mem, eĉ se kelkaj el la postaj legedoj de la kronikoj ne povas esti pruvitaj kiel precizaj hisoriaj faktoj. Kiam oni eltrovis la koron de budhismo kaj fidele sekvas kaj plenumas la budhan istruo en sia ĉiutaga vivo, oni ja estas boa sekvanto de la Iluminulo, modela budhano, malgraŭ la argumentado de tro kritikemaj kleruloj esploraj, kiuj provas pruvi al ni, ke ĝi estas nek filozofio nek religio en rigora senco de la vortoj. Por ke oni povu persisti en la aplikado de la *Koro de Budhismo*, oni ja unue devas boe koni ĝin per studado.

## La Avantaĝo de Sistema Studo de Budhismo

La utilo de tia studo konsistas en nia lernado ne nur kompreni sed ankaŭ instrui, diskuti kaj defendi budhismon, se estas necese. Multaj studantoj de budhismo, kaj ankaŭ la esperantistaj budhanoj, deziras havi facilan kaj iom amuzan instruadon pri budhismo, ĉiam de nova kaj interesa aŭtoro aŭ preleganto. Tial multaj eniam ellernas la puran Dharmo laŭ la aŭtentikaj tekstoj de la Paroloj de la Budho mem, speciale ne laŭ la paliaj tekstoj, tial ili ĉiam estas en la klasoj por komencantoj aŭ en la mezaj klasoj de la Dharmo-lernado.

En la oriento oi nomas budhanon *sperta en la Dharmo*, se li scias recitative ripeti perfekte en palia lingvo la *Kvin Moralajn Maksimojn* aŭ regulojn (palie: *panĉasila*, sinhale: *pansil*), la adoron al la Bdho, la *rifuĝon* kaj la kutimajn versojn de adorado de la *Tri Juveloj*: la Budho-Dharmo-Sangho. Tio ja signifas la deklaron de sia konfido al la Iluminulo (la Budho), lia Instruo pri liberiĝo per ilumina scio, kaj la monaĥaj disĉiploj sekvintaj kaj sekvantaj la noblan vojon al ilumina liberiĝo. Se tia sperta budhano ankoraŭ povas recitative deklami iajn versojn de protekto (palie: *paritta*), kaj eble eĉ scias parkere multajn versojn el la *Dharmapado* (la kolekto de budhanaj maksimoj kaj eldiroj de la Budho), kaj ankaŭ iajn Parolojn de la Budho (*sutta*) en la palia lingvo, li jam estas akceptata kiel modelo kaj gvidanto en ĉiuj aferoj rilataj al budhismo. Li estas kompetenta konduki publikan adoradon, aranĝi predikojn, gvidi societojn, instrui siajn infanojn kaj lernantojn pri budhismo, kaj eĉ anstataŭi monaĥo (*sanghanon*) ĉe funebraj ceremonioj kaj doni konsilon kaj konsolon laŭbudhanan en domoj de grave malsanaj aŭ eĉ mortantaj budhanoj, kaj li povas konduki prelegojn aŭ klasojn pri budhismo. En budhanaj landoj tio sufiĉas, se aliaj religioj kaj kontraŭreligiaj movadoj ne atakas kaj ne

kritikas budhaojn kaj budhismon. Sed se kritiko de budhismo kaj atakoj kontraŭ budhismo bezonas defendon kaj komparan klarigon de budhismo kontraŭ la kritiko kaj atako, eĉ tia kompetenta tradicia spertulo ne sufiĉas, kaj oni sentas, ke klerulo devas helpi. En la okcidento, kie budhismo ĉiutage luktas por sia ekzisto meze de nebudhanoj, kaj ankaŭ en la fora oriento, kie budhismo devas defendi sin kontraŭ novaj movadoj celantaj detrui budhanan vivmanieron kaj studon de la Dharmo, pli intensiva studo de budhismo estas nepre imperativa devo de ĉiu sincera budhano. Ĉe esperantistoj pli intensiva kaj ekstensiva [tiel!] edukado en la Dharmo ebligus nin havi nian propran literaturon, decan presitan revuon, kaj gvidantojn internaciajn, kiuj ja povus helpi la nacian budhismon, kie tia helpo estas necesa: tie ĉi Esperanto pruvus sian valoron al la neesperantista mondo budhana! Tiuj ĉi faktoj klare elmontrus nian konfidon al ĉiuj, kiuj iome interesiĝas pri budhismo. Tial ja ni prezentas tiun ĉi sisteman instruadon en la Dharmo, por refreŝigi nian pasintan scion kaj plivastigi nian horizonton budhanan.

**DU ASPEKTOJ DE LA DHARMO** povas esti distigataj kaj perceptataj de la serioza studanto: La institucia aŭ organizita budhismo religia, kaj la persona gvida filozofio morala. **INSTITUCIA ORGANIZITA RELIGIO** estas la kutima formo de tradicia budhismo de la popoloj budhanaj en la oriento. **BUDHISMO KIEL PERSONA GVIDA FILOZOFIO MORALA** superas ĉe klerloj orientaj kaj ĉe la okcidentaj studentoj de budhismo. Multaj sinceraj sekvantoj e la Dharmo estas malagrable surprizitaj per la malaperado de religia entuziasmo kaj fervoro ĉe la denaskaj budhanoj, kaj indiferenteco al la organizita movado kaj al ĉia organiza laboro ĉe la okcidentaj sekvantoj de budhismo. Sed atentema observanto perceptas konstante kreskantan sindonon al budhismo en la tuta mondo, speciale ĉe la kleruloj: nur oni konstatas, ke estas la persona gvida filozofie morala aspekto de la Dharmo, kiu superas kaj gravas ĉe ili, se ili ne subtenas templojn kaj ne abonas la literaturon budhanan.

**INSTITUCIO ORGANIZITA BUDHISMO RELIGIA** centriĝas ĉirkaŭ la monaĥejoj kaj temploj kun iliaj societoj kaj agadoj instruaj kaj socialaj. **BUDHISMO KIEL PERSONA GVIDA FILOZOFIO MORALA** kutime prenas la formon de literatura ativeco, studo, ŝato de legaĵo pri budhismo, instruado kaj disvastiga propagando de budhismo, kun la deziro apliki en sia ĉiutaga vivo la ĉiam vivan kaj aktualan instruon de la Iluminulo. Ambaŭ aspektoj de budhismo devas nepre kunfandiĝi en la vera budhano, por ke oni meritu la nomon de vera budhano, kaj se budhismo floru kaj kresku ĉe ni kaj en nia ĉirkaŭaĵo. Kiam la sintezo de interna adora admiro kaj amo por la Budho, lia Dharmo kaj Sangho esprimiĝas en aktuala riverenco kaj modela vivo konforme al la etikaj principoj, la sintezo aŭ kunfandiĝo de la du aspektoj de budhismo estas realigita.

Nia sistema instruado de budhismo konsistos en klarigoj de la signifo de la tri rifuĝoj aŭ juveloj (palie: *tisarana*, *tiratana*), nome la Budho, lia Instruo aŭ Dharmo, kaj la

Komunumo de la Adeptoj aŭ Disĉiploj sekvantaj, realigantaj kaj instruantaj la Dharmon, la Vojon el sufero kaj nescio al Ilumina Liberiĝo aŭ Liberiga Iluminiĝo atingita per sekvado de la Vojo.

**BUDHISMO** estas la sistema instruo de la Budho kaj de liaj eminentaj disĉiploj. Ĝi estas la filozofio kaj etika religio. Nia fonto de informo pri budhismo estas la plej fruaj aŭtentikaj paroloj de la Budho laŭ la palilingvaj tekstoj de la kolekto nomata la **Tipitako**: La Tri Kolektoj de Instruoj skribitaj. La tri kolektoj aŭ *Tipitako* enhavas la parolojn kaj la regulojn donitajn de la Budho mem aŭ de liaj plej eminentaj disĉiploj, kiuj vivis 45 jarojn kun la Majstro.

**LA BUDHO**, aŭ Iluminulo, aŭ Vekiĝinto kaj Scianto aŭ Komprenanto, estas historia persono, la perfektiĝinta iluminulo, la vekiĝinta kaj liberiĝinta kompatema instruinto, kiu per sia propra energia penado eltrovis, elkomprenis kaj malkovris la Veron nomatan la *Dharmo*, kaj kiu havas la kapablon instrui al ĉiuj inteligentaj disĉiploj tiun veron kaj vojon al memrealigo de la Vero instruita de la Budho.

**LA DHARMO DE LA BUDHO** estas la etike filozofia Instruo de la Iluminulo, la kosma kaj morala Leĝo reganta en la mondo kaj la vivo de la homoj. Tiu ĉi Leĝo, ne konata tiam en sia tuteco kaj perfekteco, estis do perfekte elkomprenita kaj komplete elmontrita kaj proklamita, ripete instruita dum 45 jaroj de la Majstro mem al la sekvantoj de la Budho.

LA SANGHO estas la Ordeno aŭ Komunumo, unuiĝo, komuniĝo aŭ socio de la veraj disĉiploj kaj sekvantoj de la Budho, kiuj jam atingis aŭ penadas atingi la veron kaj la perfektiĝon unue proklamitan de la Budho, kaj kiuj per modela vivo kaj instruado kaj gvidado zorgas pri la daŭrigo de la scio kaj kompreno pri la *Dharmo*, la sistema instruado de la vojo al liberiĝo. Kvankam la nova kutima uzo de la *Okcidenta Budhana Ordeno* preferas la vorton *Ordeno* por kaj la la ordenitaj kaj laikaj budhanoj, tiu ordeno ne konformas al la *Sangho* laŭ la frua instruado, ĉar en la palia lingvo en kiu ĉiuj instruoj de la Budho estas konservataj kaj diligente studataj, la vorto *sangha*, kiel teknika termino, indikas la senhejmajn membrojn de la Unuiĝo de la Disĉiploj, kiuj ricevis la superan konsekron (palie: *upasampadā*) kaj nur ili rajtas nomi sin *sanghaoj* (palie: *bhikkhu*), kaj eĉ novicoj (palie: *sāmanerā*), kvankam laŭ ekstera apero ili tute similas al la aliaj anoj de la Sangho, tamen ne estas sanghanoj en la teknika terminaro. Ili ne havas la rigorajn regulojn, kiuj estas devigaj por la sanghanoj, kaj ili ne partoprenas en la interna memadministrado de la Sangho. La novulo memoru, ke en la Sudorienta Azio budhana al la Sangho apartenas nur la monaĥoj kun la supera konsekro nomata *Upasampada*, kaj kiuj vere sekvas kaj plenumas la rigorajn regulojn nomatajn *vinajo*. Nur tiuj ĉi sanghanoj formas la sanghon, la Ordenon de la gardantoj kaj plenumantaj instruistoj de la Dharmo. Por eviti konfuzon, oni povas ja nomi la laikajn kaj la konsekritajn sekvantojn de la moderna Okcidenta Budhana Ordeno *anoj de la Budhana Komunumo*; kaj

se tio ne eblas, oni ja uzu la vorton *Ordeno* por si kaj uzu en Esperanto la vorton *Sangho* kaj *Sanghano* nur por la sudoriente aziaj monaĥoj de la palia skolo theravada.

**BUDHANO** estas persono, kiu akceptas la gvidadon de la **Tri Rifuĝoj** - Budho, Dharmo kaj Sangho - kiel la plej riverencindajn objektojn en la mondo, antaŭ kiuj budhaoj kliniĝas plej respekteme, kaj interne kaj ekstere adorante ili kiel la plej valorajn objektojn, ofte nomante ilin aŭ *rifuĝo* aŭ *juvelo*, palie: *tisarana, tiratana*, la **Tri Rifuĝoj** aŭ la **Tri Juveloj**. La budhano riverencas la Ilumiulon, studas la Instruon, plenumas la doktrinon kaj etikan filozofion kiel siajn instruantojn, sed anaŭ plej volonte kaj entuziasme kaj fervore subtenas ilin per ĉiaj necesaĵoj por ilia subteno kaj sukcesa laboro de liberiga iluminiĝo por ĉiuj.

## La Esenco de la Dharmo

**La Kvar Noblaj Veroj** pri Sufero, la Estiĝo de Sufero, Ĉeso de Sufero kaj la Nobla Okera Vojo gvidanta al la ĉeso de sufero estas la speciala kaj origia instruo de la Iluminulo. Tiuj ĉi kvar noblaj kaj puraj veroj troviĝas nur en budhismo origina kaj nenie en aliaj sistemoj, almenaŭ ne en la perfekteco kaj klareco en kiuj ili estas proklamitaj de la Vekiĝinto. Tiuj ĉi kvar veroj neniam estis instruataj al novuloj sen preparo por kompreni kaj akcepti ilin. Al nova disĉiplo, speciale al laika vizitanto, la Majstro unue parolis pri malavareco aŭ donemo, pri virto aŭ la plenumo de la moralaj devoj kaj principoj, kaj pri la bonaj rezultatoj sekvantaj el tia denemo, virto kaj bona vivmaniero, kaj en tiu ĉi vivo, kaj atingotaj en sekva renaskiĝo en ĉielo aŭ en feliĉa stato en nia aŭ alia mondo. Vidante, ke la aŭskultanto ŝatas kaj aprobas tian parolan instruon, la Perfektulo montris en multaj metaforoj la mizeron de ĉia sensplezuro; li elmontris aŭ malkovris al sia aŭskultanto la nekontentigan naturon de ĉiaj sensaj plezuroj kaj klarigis la beatan staton, kiu sekvas el forlaso kaj rezigno de ĉia sia soifa deziremo kaj sopiro mondeca. Vidinte, ke la koro de la aŭskultanto akordiĝis kaj fariĝis impresiĝema al la elkompreo de la plej alta vero, la Budho montris en multaj trafaj metaforoj, ke vivo, ĉu en nia, ĉu en alia mondo, ĉu en ĉieloj, ne estas la plej alta feliĉo, ĉar pro sia nedaŭro, ĝi ĉiam kondukas al nova renaskiĝo kaj sufero. La radiko, la ĉefa kaŭzo, de ĉia sufero estas soifa deziremo aŭ sopiro por sensaj plezuroj kaj ĝuoj, por daŭrigo de vivo kaj evntuale por ĉeso de vivo. Se tiu ĉi triobla deziremo ĉesos, ĉia sufero estingiĝos. La vojo al la estingo de ĉia sufero estas la nobla okera vojo, nome virta vivo, kulturo mensa kaj spirita, kaj atingo de saĝo liberiga. Akiro de tia saĝo signifas la intuitivan elkomprenon aŭ iluminiĝon, kiu rezultiĝas en liberiĝo de ĉia deziremo kaj tial de ĉia formo de sufero. *Virto, meditado, saĝo* kaj *liberiĝo* estas la plej konciza resumo de la Nobla Okera Vojo al ilumina liberiĝo aŭ liberiga iluminiĝo. *Donemo, virto* kaj *mensa kulturo* estas la sama vojo aŭ metodo sekvata de laika budhano, sekvanto de la Iluminulo. *Aŭskultu kaj studu, memoru, kaj plenume sekvu la Dharmon*, estas la sama vojo aŭ metodo laŭ tiu ĉi resumo. La studado de la Dharmo kondkas al ĝia aplikado, kaj la

aplikado de la Instruo pri Ilumina Liberiĝo sigifas progreson, evoluon, kaj disvolviĝon de spiritaj kapabloj, faktoroj mensaj, kiuj kondukas al la efektivigo de ilumina liberiĝo.

La leganto ofte miros pri la tre ofte ripetataj vortoj, *Iluminiĝo, Liberiĝo*, *ilumina liberiĝo* aŭ *liberiga iluminiĝo*. La vortoj uzataj en tiu ĉi konteksto signifas la staton de la menso atingita de la Budho dum la nokto de sia Budhiĝo. La klara elkomprfeno de la vero, ke ĉia formaĵo, ĉia fenomeno, eĉ la plej granda plezuro mondeca estas nedaŭraj, nekontentigaj kaj senesencaj, ne nia memo, ne nia mio aŭ la vera absoluta esenco supozata enesti en ĉio, kondukas al ĉeso de ĉia postulemo, soifa deziremo kaj sopiro pri io ajn en la mondo. Pro tia profunda kompreno dum fortega koncetriĝo spirita, oni liberiĝas de ĉia nescio, de ĉia diziremo kaj de ĉia sopiro, oni atingas staton, kiun oni nomas en palia lingvo *Nibbana*, senksrite *Nirvana*.